



# PENSEO

*N-ro 197*

*marto / 2008*

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 19-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Rimportretoj

### Guozhu



#### Arka

Arka, montpinto en mateno\*  
siluetas je dokta belo.

Ĉiam strebo por nova celo,  
nova ating' per nova peno.

Homa vivo estas areno,  
ne mankas missorta kruelo.  
Arka, montpinto en mateno  
siluetas je verda belo.

Sonĝojn realigas en beno  
ŝi per diligent' de abelo  
kaj persistemo de kamelo,  
ĝis pompa doktoriĝsoleno.

Arka, montpinto en mateno!

\* Laŭsenca traduko de ŝia nomo



#### Wei Shan

Wei Shan, vaganta kavaliro,  
sendependa en mens' kaj ago,  
batalas sub verdstela flago,  
lerte aŭkcias per inspiro.

*Help' al Tibet'*, bela aspiro,  
realiĝis post milzigzago.

Wei Shan, vaganta kavaliro,  
sendependa en mens' kaj ago.

Li ofte per justa rapiro  
batas kontraŭ insida sago  
de maskuloj kiel repago.  
Brave! aklam' kun admiro:

Wei Shan, vaganta kavaliro!



#### Ĉinso

Ĉinso, kun mano majstre lerta,  
scipovas preskaŭ ĉion fari  
kaj strebadon neniam ŝpari.  
Multfake li montris sin sperta,

pri komputil' ankaŭ eksperta,  
ĉu uzi, flegi aŭ ripari.

Ĉinso, kun mano majstre lerta  
scipovas preskaŭ ĉion fari.

Pro multjara servado verda:  
stencili, tajpi, menuari,  
kaj pentri, belskribi, muari...  
lia merito estas certa.

Ĉinso, kun mano majstre lerta.



#### Even

Even preĝas sub kokosarbo  
sudmare en Hainan-insulo.

Akompanas lin himne hulo  
kaj sankte Zamenhofa harpo.

Fondusis Penseon per farbo  
li laŭ mecenata kalkulo.  
Even preĝas sub kokosarbo  
sudmare en Hainan-insulo.

Instruas li rete per varbo  
de kursanoj, fortakumulo  
por devo, misio, stimulo  
al Movado per piekarbo.

Even preĝas sub kokosarbo.



## Li Jun

Li Jun kabeis senrevene,  
bedaŭrinde ĉi veterano,  
soldato kaj kompartiano,  
miskulpigita ekzamene.

Pri UK li versis revplene,  
kun fantazio en elano.  
Li Jun kabeis senrevene,  
bedaŭrinde ĉi veterano.

Stencile li presis multpene,  
en jardeko de uragano.  
Sed ĉio lia iĝis vano,  
fine elreviĝis ĉagrene

Li Jun kabeis senrevene.



## Miaohui

Miaohui, E-kurson gvidas pie  
en Templo de Multa Trezoro.  
Kursanoj lernas kun fervoro  
internacie harmonie.

Tradukas fablojn religie,  
al budaismo kun adoro.  
Miaohui, E-kurson gvidas pie  
en Templo de Multa Trezoro.  
Kaj venas ankaŭ devkonscie  
prelegi fremda profesoro.  
Efike per reta laboro  
nun propagandi energie,

Miaohui, E-kurson gvidas pie.



## Ardo

Ardo aktivas sur loeso,  
fosi sulkon per verda ŝpato,  
pri beletro ĉiam kun ŝato,  
Esperanto por vivneceso.

Versi ĉineskojn en progreso.  
Ĉinnome ŝajnas mia frato.  
Ardo aktivas sur loeso,  
fosi sulkon per verda ŝpato.

Ni kunlaboras en kongreso,  
por novlibroj iniciato.  
Ĉio iras en orda glato.  
Por ankoraŭ nova sukceso,  
Ardo aktivas sur loeso.



## Arbsemo

Arbsemo, kun verdo en koro,  
Esperanton ĉie dissemas,  
prelege pri helplingvo temas,  
edife pri inda furoro.

Aŭ en hotela koridoro,  
babile propagandi emas.

Arbsemo, kun verdo en koro,  
Esperanton ĉie dissemas.

Interrete daŭas laboro:  
Enhavoriĉa blogo gemas.  
Revo pri arbariĝo kremas,  
kaj rekompencos per favoro.

Arbsemo, kun verdo en koro.



## Lin Liyuan

Lin Liyuan planas pri Kongreso  
Ŝafurba, por movad-prospero,  
malgraŭ Aĉova interfero,  
subfos', nejusta malpermeso.

Stimuli per koma senĉeso  
LKK por rekord-konkero.  
Lin Liyuan planas pri Kongreso  
Ŝafurba, por movad-prospero.

Ĉia programo al progreso  
sub la signo de La Espero.  
Per komuna fortofedero  
realiĝas plena sukceso

laŭ plan' de Liyuan pri kongreso.

## Seimin

Seimin tradukis silente  
en Ruĝfunebra Kabineto.  
Ruĝdoma Songô en kompleto  
fine aperis monumente.

Pri vanta fam' indifere,te,  
vivas ermite en hermeto.  
Seimin tradukis silente  
en Ruĝfunebra Kabineto.

Edukis filinon atente  
ekde ŝia tempo de feto

denaska esperantisteto.  
Plensukcesis eksperimente.

Seimin fruktdonis silente.



## Bingxin

(1900-10-05/1999-02-28)  
Bingxin-glacie pura koro\*  
-amata avino centjara,  
al infan-legantaro kara  
ĉiam leteris kun fervoro.

Ŝia homeco kaj laboro  
modelas per honesto rara.  
Binxin-glacie pura koro  
-amata avino centjara.

Kaj ŝi surskribis je favoro  
vorton pri Esperant' deklara.\*\*  
Vamra subteno malavara  
vivos en nea karmemoro.

Bingxin-glacie pura koro!

*\*Laŭsenca trad. de ŝia nomo.*

*\*\*En 1994 Bingxin surskribis:  
Se vi komprenas Esperanton,  
vi komprenas la tutan mondon.*



## Li Yuping

Li Yuping servis en Pekino.

Pro ŝia laboro per-sona,  
kaj ĉarma kvalito persona  
iĝis fama parolistino.

Aŭskultantoj serĉas sen fino,  
laŭdas ŝin amikino bona.

